



Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Marto : 2 2022

AMASA APLIKO DE MORTO-PUNO EN SAŬD-ARABIO

Hieraŭmem, 81 homoj estis ekzekutataj en Saŭd-Arabio. Temas pri la plej amasa apliko de leĝaj mortigoj en tiu regnolando. Laŭ oficialaj komunikiloj de Arabio, la ekzekutitoj estis aŭtoroj de malsimilaj deliktoj, inter ili murdoj de infanoj kaj virinoj, terorismo kaj apogo al ribelantaj grupoj de Jemeno, kontraŭ kiuj la armeo de Saŭd-Arabio luktas de antaŭ kelkaj jaroj.

Laŭdire, la registaro de tiu regnolando elektis okazigi tiun amasan ekzekuton dum ĉi tiuj tagoj, kiam la mondo tenas sian atenton al la milito inter Rusio kaj Ukrainio. Alie, dum la lastaj monatoj la nombro da ekzekutoj malpliigis pro la krizo de la KOVIM-19



Publika ekzekuto en Saŭd-Arabio

Saŭd-Arabio estas la ŝtato en la mondo kiu pleje efektivas tiun teruran punon. De antaŭ multaj jaroj, internaciaj organizoj, inter ili Amnestio Internacia, petas al la araba registaro la kompletan abolon de la morto-puno.

En la jaro 2020, ties registaro informis, ke oni nuligus la mortopunon al tiuj, kiuj en la momento de la delikto estis malpli ol 18-jaraĝaj, kaj nur se tiuj deliktoj ne rilatis al terorismo. Tiam, la morto-puno estus anstataŭgita, nur en tiuj okazoj, per enprizonigo dum maksimume 10 jaroj. Laŭ inormoj de Amnestio Internacia en Saŭd-Arabio ĉiujare pli ol 150 homoj estas ekzekutitaj.

En ĉi tiu lando, deliktoj kiuj ne kaŭzas mortojn, ekzemple: adulto, rabo sen murdo, drogherb-komerco, seksa perforto, kaj kelkaj aliaj, kiuj verdire temas pri superstiĉoj, kiel sorĉado, estas punitaj per publika ekzekuto. Ĉi tiuj deliktoj estas interpretataj laŭ la religiaj preceptoj de la ŝario.

Vorto de la Semajno

Alimento: Devo provizi parencon aŭ boparencon per la vivrimedoj necesaj al ties situacio. Rajto pri asistado, kiun ĉiu homo posedas pro dependenco, de la naskiĝo kaj ĝis difinita aĝo aŭ pro manko de vivrimedoj dum la matura aĝo, aŭ pro ne-kapableco mensa aŭ korpa.

Alimentato: Homo kiu rajtas ricevi la alimento-kompencon.

Alimentanto: Homo devigita realigi la alimenton-kompencon.

Provizora alimento-kompenso: Temas pri mon-kvanto periode pagota al parenco, dum la tempo kiam daŭras la proceso ĝis la aprobo de definitiva juĝo.

Definitiva alimento-kompenso: Mon-kvanto aprobita per juĝo, kiu estas periode pagata al alimentato.

Kutime, la alimento-kompenso daŭras ĝis fiksita dato, ekzemple, kiam la ido atingas sian 18-an vivo-jaron aŭ kiam li/ŝi finas siajn studojn aŭ eklaboras. La alimento-kompenso ankaŭ povas esti porĉiama, ekzemple: la devo de la gepatroj rilate idon mense malkapablan kun la celo havigi al li/ŝi la plej elementajn vivrimedojn.



Laŭ la leĝa vidpunkto, la alimento-devo ne nur rilatas al nutrado, sed ankaŭ al vestado, domo, edukado kaj sanitara asistado.